



Eldonas : Cercle espérantiste de * Abono por unu jaro : 18 FF
l'Agenais, F 47340 LAROQUE * (14 FF por Francio)
Poŝtkonto : 3 371 74 M Bordeaux * al la ĉi-apuda pĉk.

la kastelnova grupo

EN LA KLUBA BIBLIOTEKO



* Jam fine de januaro aperis la duvoluma originala verko de nia mortinta SAT-ana kamarado Petro DIKSZTEJN "Inter Sovetaj Popoloj" (1939-1946).

2x176 paĝoj, 20 FF kun afranko. Recenzo aperos en venonta numero. La antaŭmendintoj kaj parto el la broŝurabonantaro jam ricevis ĝin. La ceteraj abonantoj baldaŭ estos "servitaj", sed intertempe mi komencis la reeldonadon de ...

* "KIEL DIRI...?", kiun senpacience atendas mendintoj kaj ...la kompilinto mem. Nu, la afero estas sur bona, rapida, vojo. En marto mi esperas, ke ĉiuj estos kontentigitaj. En tiu 3a eldono la antaŭe listigitaj eraroj estas korektitaj en la teksto mem. Krome, malsupre de ĉiu paĝo vi trovos la ĉapitro-numeron. Ĉar ne eblis retajpi la tuton, ne eblis numeri la paĝojn alimaniere.

Interesatoj povas jam (re)mendi tiun jam faman E-perfektigilon, kiu je ĉiu eldono fulme elĉerpiĝas !

La vendkondiĉoj iom ŝanĝiĝis, ĉar la afrankokosto fariĝis tro peza, por ke la broŝurservo prenu ĝin sur sin, kiam temas pri etaj mendoj. Do, de nun, se vi mendos nur 1,2,3 aŭ 4 ekzemplerojn, ĉiu ekzemplero kostos al vi 15 FF + afranko (ne pli ol 20%). Ekde 5-ekzemplera mendo, sama prezo kiel pasintjare :

po 12 FF, kun afranko inkluzivita. Ĉiu grupo arigu do la mendojn, por ke estu minimume 5 ekzempleroj sendotaj samtempe. Dankon!

Kribo.

Cornelius TRIMBORN, Josefstr.23, D-4790 PADERBORN-Elsen bezonas junajn francajn korespondantojn por siaj lernantoj 13-,14-,15-jaraj. Profitu la okazon !

Pro neceso anonci sufiĉe frue iujn grupkunvenojn, en tiu ĉi "Laŭte!" mankas la felietono de Alfa-Beta kaj "Esperanto-Gramoj". Vi ricevos vian porcion en venonta numero, meze de aprilo. La rubriko "E-vivo" troviĝas fine de tiu ĉi numero, sur paĝoj 22 kaj 23.

Rutinemul(in)oj ne perdu paciencon! Amike al ĉiu, Kribo.

* Ĉu bankrotis la racio ?

Tri ceteraj kontribuoj pri tiu temo, Unue, tiu de

Janseb : *****

R A C I O E S T A S N U R I L O...

De post la prahistorio la homo fabrikis ĉiajn ilojn. Racio estas ilo inter aliaj. Kiam uzata racie, ĝi ebligas progresojn. Uzata neracie, ĝi malfermas la pordon al ĉiaj krimoj. Same estas por racio kiel por aliaj iloj.

Racia penso ne povas ĉion fari, precipe miraklojn. Racia homo devas scii tion kaj agi konsekvence. Li scias, ke en multaj kampoj, racio devas cedi la lokon al intuicio aŭ sperto, ĉar foje estas tro da faktoj - aŭ sensaĵoj - por ke racia penso povu ĉiujn ilin konsideri.

Kiam raciaspekta rezonado kondukas al absurdaĵo - ekzemple sistemo por feliĉigi la homojn, kiu kapablas nur malliberigi kaj malfeliĉigi ilin - tio pruvas, ke "racio" ne taŭgas en tiu kazo.

Socio estas tute ne racia. Kial ĝi tia estus ? Unue, ĉar homoj ne havas la samajn interesojn. Due, ĉar ili mem ne estas raciaj. Kial egalece disdoni ĝuadon, kiam estas homoj, kiuj al si donas moralon, kiu malpermesas al ili ĝui eĉ la senpagajn plezurojn ?

Racio estas ankaŭ arbitrilo inter homoj, kiuj ne interkonsentas unu kun la alia. Dank'al racio, ili povas diri : "Tio estas vera, ĉar mi povas ĝin provi" anstataŭ :

"Tio estas vera, ĉar ONI tion diris al mi". ONI povas esti estro, patro, pastro, profesoro, filozofo, guro, ktp. Bedaŭrinde, ne estas la sama ONI por ĉiuj. Do konfliktoj por decidi kiu, pli ol alia, rajtas diri kio estas vera.

Racio donas al ili ilon por pruvi kion ili asertas. Kiam marksisto asertas (almenaŭ implicite) "Iniciato neniom aldonas al la produktado", li respondecas pri tia aserto. Ankaŭ kiam kapitalisto diras (ankoraŭ implicite) : "Ĉiu povas libere elekti sian laboron". Sed neniam, kompreneble, iu provis tion.

Konklude, mi diros, ke racia neracio aldonas fantazion al la vivo, sed neracia racio kondukas al la plej aĉaj frenezaĵoj.

Janseb

* *

Suzanne : Filozofo difinis la inteligenton kiel
***** "provo profiti de la sperto".

"Se esti inteligenta konsistas profiti de sia sperto kaj de tiu de la aliaj, evidente, ni timas, ke inteligenteco tre ŝpareme estis disdonita al la homo. De miljaroj la historio ripetigas, aldonante novajn malfeliĉojn al la malnovaj. Kaj, individue aŭ kolektive, la homo ne singardas pri tio, kion oni ne plu konsideru kiel originan fatalon : jen memvola hommortigo, jen la sklava submetigo de aliulo, jen la senposedigo, brutala aŭ subtila, de aliulo ; neniu el ĉiuj ĉi malbonfaroj, kiuj estas la honto kaj la malfeliĉo de la Homaro, estas fatala. Ili estas antaŭvideblaj konsekvencoj de ia sociorganizo. La malegaleco en la disdono de la konsumhavaĵoj aŭ de la ĝuado estas ĉe la bazo de ĉiuj konfliktoj, tiel sur la individua kampo kiel sur la kolektiva. Ĉiuj procesoj, ĉiuj strikoj, ĉiuj militoj, ne havas alian originon."

Tio ĉi-supra estas ekstrakto el artikolo titolita "Se la homoj estus inteligentaj".

Se la homoj estus inteligentaj, ili starigus sociorganizon, kies produktado limiĝus je la konsumado.

Tiam ili ne laborus pli ol 4 horojn tage. Ĉiuj homoj laborus. La laboro estus ĝojo. La homo estus libera por ĝui la feliĉon, kiun ĉiu vivanta individuo povas trovi meze de la naturo. En tia harmonia homsocio, ĉiu personeco estus konsiderata kaj kulturata, kaj ĉiuj pleje profitus de la sekretaj riĉaĵoj, kiujn ĉiu individuo enhavas.

Nun, loĝantoj de insulo, kies nomon mi ne plu memoras, limigas la produktadon je la konsumado.

Tio ĉi-supra ne estas utopiaĵoj... Por tion realigi, sufiĉus, ke la plimulto konsciis kaj deziru tion.

Simila ŝanĝo okazus pri la virina kondiĉaro.

Laŭ mi, la universaligo de Esperanto ne kondukos ĝin al morto... Tio permesos al ĉiuj senpere interŝanĝi ideojn. Estas la rolo de SAT disvastigi la idealon de frateco kaj la rimedojn por atingi "la feliĉon de l'Homaro".

La universaligo de Esperanto ne signifas la malaperon de la kulturecaj emoj diverslandaj. Kiel iuj insiste asertas... Esperanto estas nur helpa lingvo !

Same kiel familianoj estas malsamaj, la loĝantoj de ĉiu lando diversmaniere vivas. Sufiĉus nur la influo de ilia geografia situo.

Tute certe, ankoraŭ nenie ajn la homoj ĝuis socialismon, komunismon... De longe tiuj vortoj estas misuzataj !

Suzanne.

* *

Nicole : Ŝajnas al mi, ke en la statuto de SAT "racio"
***** signifas "kapablo per kiu homo diferencigas veron de malvero, bonon de malbono" (same kiel klarigas mia vortaro). Tie racio aperas kiel justa spirito, juĝokapablo, sed ĉu tiu klarigo estas racia ?!

Mi ne volas nek kapablas filozofi pri tiu temo. Mi volas diri nur, ke se oni komprenas "racion" kiel panaceon, celon, certe oni eraras kaj limigas siajn kapablojn, siajn vivfortojn. Lingvo eĉ racie elpensita kiel Esperanto, ĉiajn ajn pensojn, ideojn, sentojn povas esprimi. Se ne, ne estas vera lingvo. Laŭ mi, racio estas nur rimedo por esprimi, pruvi ĉion, eĉ la plej malracian aserton...

En la ekstrakto el la statuto de SAT estas aliaj vortoj

rimarkindaj kaj ne disigeblaj unu de la aliaj :
 "memstare", "liberigo de sia klaso"... Ĉi tie racio
 aperas kiel rimedo, helpilo por liberiĝi, laŭ politika
 senco, soci-konscio. Estus grava eraro forpuŝi tiun
 rimedon, sciante ke homo, vivo, ne estas raciaĵoj,
 feliĉe ! Nicole.

 Jen nun nova temo, proponita kaj enkondukita de J.G. :

 * Ĉ U M I T A P R O L E T A R A *
 * R E V O L U C I O , *
 * Ĉ U K O N S T R U A D O D E *
 * T U J A A L T E R N A T I V A *
 * S O C I O ? *

De du jarcentoj, la aktivuloj de la laborista movado
 vivis en espero pri proletara revolucio, kiu devus for-
 peli la kapitalismon kaj starigi socialismon, - kun pro-
 vizora laborista diktaturo kaj laborista ŝtato (malpli-
 iĝonta) ĉe la marksistoj ; kun liberecana socio tuj sen-
 klasa kaj senŝtata ĉe la anarkistoj.

Tiu revolucio estos farata de la laboristaro ekkapt-
 anta la fabrikojn, la kampojn, la transport-rimedojn
 ktp, kiuj devos funkcii profite al la tuta laborista
 klaso. Kio fakte okazis, kie la laboristoj laŭdire ven-
 kis ? (Krom en Hispanio en 1936 dum mallonga periodo)?
 Kasto de novaj estroj anstataŭis la malnovajn, tuj ili
 forigis ĉiujn individuajn liberojn kaj metis en karcer-
 ojn aŭ laborkampojn la oponantojn (Sovetio kaj orientaj
 landoj, Ĉinio, Vjetnamio kaj diversaj landoj en la Tria
 Mondo).

En la superindustriigitaj landoj la proletaro, bone
 enkadrigita en la sindikatoj kaj la politikaj partioj,
 ne celas faligi la kapitalismon; eĉ se tio estus ĝia
 intenco, la forto de la nunaj subpremaj aparatoj tion
 malebligas. (En sia libro - en franca lingvo - "Adieux

au prolétariat" (Adiaŭoj al la proletaro) André Gorz
 bone analizis la nunan evoluon de la proletaro).

Se mi ne plu kredas je klasika laborista revolucio,
 mi opinias, ke ekzistas tamen eblecoj ŝanĝi ne en duba
 futuro, sed de nun, la ĉiutagan vivmanieron.

Jam en Okcidenta Germanio pluraj miloj da personoj
 vivas ekster la tradicia sistemo en komunumoj (laboro
 kaj loĝejo), havas siajn proprajn gazetojn, presejojn,
 lernejojn, infanĝardenojn, trinkejojn, restoraciojn,
 ktp. En Usono la t.n. "adeptoj de la memvola simpleco"
 (kvin milionoj) apartiĝis disde la usona konsumsocio kaj
 provas aliajn ekonomiajn kaj homajn rilatojn. En Francio,
 unuflanke la revuo "Autrement" (Alie) kaj aliflanke la
 "Réseaux Espérance" (Retoj "Espero") komencas kunordigi
 la alternativajn eksperimentojn en la diversaj fakoj :
 ekonomio, sano, edukado ktp, kiuj en disaj lokoj serĉas
 aliajn sociajn fundamentojn.

Aĉa reformismo ! diros la aktivuloj, kiuj ĉiam opinias,
 ke "la povo estas ĉe la pinto de la pafilo". Eble. Sed
 mi kredas, ke sen revolucio en la mensoj, ni ŝanĝos nur
 la estrojn (Irano, Portugalio, ktp) kaj la mensoj ne po-
 vas evolui sen praktikaj spertoj pri alia vivmaniero.

Eble (sed ne certe) tiuj limigitaj sed radikalaj
 ŝanĝoj povos formordeti la "dogegan" sistemon ?

J.G.

Ĵanseb : Tuja alia vivmaniero anstataŭ perforta revolu-
 ***** cio ?

... Pri tio mi tute konsentas kun J.G. Kiel li skribas,
 revolucio ŝanĝigus nur la estrojn, ne la VIVON.

Sed eĉ en la paralelaj bataloj, la samaj fenomenoj
 okazas : apero de profitantoj kaj profitatoj. Ekzemple,
 la seksa liberiĝo. La unuaj profitas de ĝi, la aliaj nur
 batalas por ĝi. Tamen, ĉiuj estas sub la sama flago. Ĉu
 estas hazardo, ke la unuaj kaj la aliaj devenas de sociaj
 klasoj, kiuj jam profitas aŭ estas akspluatataj ?

Ĉio okazas kvazaŭ la homoj estus programitaj kiel
 komputoroj : "estu libera", "gajnu monon", "ĝuu la vivon"
 aŭ "esti libera estas danĝera", "gajni tro da mono estas

malhonestaj", "ĝui la vivon estas peko". Ĉu tiuj programoj estas en la karaktero de la homoj aŭ ĉu ili devenas de la edukado? mi ne scias. Eble ambaŭ. Sed la demando, kiu gravas, estas: "Ĉu oni povas ŝanĝi la programon?" kaj kiel? Kiel doni al la homoj la permeson esti libera, havi plezuron? Kaj poste doni al ili la scipovon por akiri liberecon kaj plezuron? La problemo ne estas sen-solva, sed necesas pli bona kono pri la maniero laŭ kiu la homoj penso funkcias.

Janseb / 7.12.80

Jacqueline: Kiel klare skribis La Boesi, homoj estas ***** servutaj per sia propra volo. Se la ekspluatatoj ribelus, ili povus forpeli la estrojn. Jes ja, sed jen la problemo: homoj volas estrojn.

Por kompreni tion, utilas legi la verkon de Stanley MILGRAM pri obeemo al aŭtoritato (francilingve "Soumission à l'autorité"; la originalo estas usona).

Demokrateco estas la principo, laŭ kiu, kiam kunvivis 51 idiotoj kaj 49 sanmensuloj, 100 homoj kondukas stulte. Se tiun principon oni akceptas, reale demokrataj estas la diktaturoj: homo ŝatas obei. Estas do demandende:

- kiel estas organizitaj la informiloj: ĵurnaloj, radio (ŝtata aŭ malleĝa), televido (ŝtatmonopolo en Francio)? Se per bona informo oni povas malstultigi 2 homojn, demokrateco estas, ke la 49 aliaj devas povi ne stulte konduki. Tial tre gravas la libero de esprimo.
- kion faru la 49? Nu, demokrate diktatura povo povas toleri iom da kontestado. En la Mezepoko, dum la karnavalo, la popolo rajtis diri, ke la episkopo iros al infero, ke la princo ne estas princido, sed putinido, ktp. Post karnavalo venas fastotempo, kaj dum la paska tempo necesas komunii por esti en (...)(nelegeble, Red.)* kun la Aŭtoritatoj. Nenio nova sub la suno, nur ke oni anstataŭigis la karnavalon per aliaj formoj. Tamen, plu la sistemo enkadrigas la burleskulon. La amuzisto de François 1er (Francisko la Unua) rajtis ĉion diri sincere. Sed nur li. Kial tiu tolero? Por plifortigi la reĝan povon.

Mi oftege demandis min, kiam mi manifestacias, kiel

*PS. Hura! Mi trovis: "esti en ordo". Bravege al mi.

perceptas nin homo sur la strato. Nu, li pensas: "Ankoraŭ manifestacio en la urbocentro, merdon, ne alvenos ĝustatempe mia buso". Jen!

Mia avino Leona procesiis al la Sankta Virgulino. Nun oni plu marŝas, oni nur anstataŭigis la flagon de la paroĥo per flago laŭdire laborista. Nenio nova sub la suno! Bleki vi rajtas, jes, sed via dezerto estas la vakuaj cerboj de televidrigardantoj. Do kontestado estas elemento en la sistemo: "Vidu, tiuj banditoj malrapidigis la aŭtobuson, per kiu, post honesta laboro, vi volis reiri hejmen. Sed ne zorgu: ni kreskigos la buĝeton de la polico, por ke via buso alvenu". Jen kiel funkcias la afero.

Do la 49 neidiotoj neniam konvinkos la aliajn. La aserto, ke laboristo estas inteligenta per la nura motivo, ke laboristo li estas, ŝajnas al mi unu el la dogmoj plej stultaj, kiujn mi konas. La 49 neidiotoj povas bredi kaprinojn en Lozero, sed atentu:

- bredi kaprinojn estas vera profesio ne amuza por kredon perdintaj eksmanifestaciantoj;
- la fromaĝon vi vendas en la kapitalistan ekonomion, kaj tiel tamen reiras al la sistemo, eĉ se nur iom. Se eblas nek komplementa aŭtarcio, nek persvado de la 51 idiotoj, kion fari? Jen la ebloj:
- rezignacii, kaj vendi la fromaĝon;
- detruu per pafiloj la reĝon de la stultuloj. Sed atentu: la dua generacio surtronigos la revoluciinton. Ĉiam: Robespierre kaj Napoleono; Lenino kaj Stalino, ktp...
- sin ĵeti al rivero. Kio estos poste, tion mi ne scias.
- provi eduki la infanojn ekde la lulilo, por ke ili ne fariĝu idiotoj. Sed atentu: plej ofte oni instruas al infanoj siajn proprajn idiotaĵojn.

Do, ĝojan, bonan jaron!

Jacqueline.

Kribo: Dankon kaj brave al ci, ho Ĵaklino, ci diris ***** lertege, kion mi vane provus surpaperigi! Domage nur, ke unu vorton el cia hieroglifa teksto mi ne kapablis dekripti. Tamen, mi sentas mian grandan meriton esti deĉifrinta la ceteron: brave al mi, dankon!

La dua parto de tiu debato - iom pesimismodona - aperos en venonta "Laŭte!".

USONIGO de FINNLANDO

Angla instruisto de Brita Konsilio en Kuopio, Finnlando, diris al mi ke Finnlando estas multe pli usonigita lando ol Anglio. Parte tio havas naturajn kaŭzojn: siatempe en Usonon elmigris centmiloj da finnoj, kiuj de tempo al tempo sendadis al siaj malriĉaj parencoj "amerikajn paketojn". Speciale post la lasta milito, kiam mankis ĉio kaj aparte kafo, tiuj sendaĵoj estis la plej granda imagebla ĝojo por niaj kafemulinoj.

Dank'al tiu favora etoso la finnaj sinjoroj faras ĉion eblan por ligi Finnlandon kiel fidelan servanton al la usona kultura imperiismo. Mi iomete prilumas kelkajn punktojn en tiu procezo sur la kampo de la lerneja instruado. Nuntempe ĉiu aĝo-klaso (samjare naskitoj) ampleksas ĉ. 60.000 personojn. La deviga lernejo daŭras 9 jarojn, la gimnazio aldone 3 jarojn. La instruado de la angla komenciĝas devige en la tria klaso kaj meznombro 3 horoj semajne estas dediĉitaj al la angla. La lernojaroj daŭras ĉ. 40 semajnojn. En la gimnazio daŭrigas siajn studojn ĉ. 20.000. Surbaze de tiuj donitaĵoj ni povas kalkuli kiom ĉiu aĝoklaso devas oferi al la angla lingvo: $60.000 \times 40 \times 3 \times 7 + 20.000 \times 40 \times 3 \times 3 = 57.600.000$ horojn! Meznombro ĉiu unuopulo do devas foroferi ĉ. 1000 horojn por la angla lingvo el la kara vivodaŭro! Kaj preskaŭ same multe da tempo oni devas oferi al hejmaj taskoj de la angla... kio estas la rezulto? Ni perdas la tempon, ni perdas la monon (ĉar la instruistoj de la angla, tute specialigita kategorio de instruistoj, ĝuas altegan salajron, 6000-7000 fmk/monate kaj havas ĉ. 3-monatan ferion plensalajre, dum ordinara laboristo havas nur 1-monatan ferion kaj lia salajro estas nur triono), ni perdas niajn nervojn, ĉar la tuta socia kribra sistemo estas nun ligita al la emo lerni la lingvon de la usonaj mastroj kaj ĉar nia lango simple ne turniĝas prononci la anglan kakofonion. - Multaj riĉaj gepatroj sendas sian idon en Usonon kaj tiaj estas jam 500... tio kostas por iliaj gepatroj po

5000 fmk... La edukministerio de Finnlando sendas talentajn lernantojn al specialaj "gimnazioj" en Anglio kaj Kanado por efektive fari ilin fidelaj al la angla lingvo. Nu, en Finnlando estas multaj porbritaj kaj porusonaj organizaĵoj, kiuj semas sian venenon, aldone ekz. mormonoj aranĝas senpagajn kursojn de la angla lingvo. Estas ne malpli humure, ke la finnaj misiistoj ekz. en Tajlando anstataŭ "prediki" aŭ fari socialan laboron aranĝas studrondojn de la angla... Kiu diablo diras ke Finnlando estas marioneto de Sovetunio? Ĝi estas neproklamita ŝtato de Usono! Tiu diablo estas la finna ekstremdekstrularo, antaŭa faŝistaro, kiu siatempe vendis la popolon kaj ĝian sangon al la hitlera Germanio, nun por kamufli sian satanan neniigon de la popola kulturo favore al la angla-usona imperiismo kriacas kaj klaĉas pri la kliniĝo al Sovetunia imperiismo. La popolo mem volas esti neŭtrala kaj resti ekster ĉiuj konfliktoj, okupi sin pri sia kulturo kaj komuniki kun ĉiuj per Esperanto (neniu popolhomo kontraŭas ĝin, sed ĉiuj sinjoroj-snobo plenforte, tamen la popolhomo laca de laboro kaj ĉiaspeca komerca trudo ne kapablas ĝin ellerni, escepte se ĝi estus lerneja fako studata en la junaĝo). Konklude: la laboro de la lernantoj, studo kaj esploro de studentoj kaj sciencistoj kuras per la angla lingvo en la poŝon de Usono. Nur Esperanto povas nin liberigi kaj laborigi por la homo kaj la homaro!

S.P. Hurttu

PS. Mi aldonu ke ankaŭ la sveda lingvo estas deviga en la lernejo. Do ĉiu nepre devas lerni du fremdajn lingvojn jam en la 9-jara baza lernejo! En la gimnazio aldoniĝas 1-2 devigaj lingvoj: germana, rusa aŭ franca, kelkfoje eĉ la latina. Ĉiutune en 8 precipaj universitatoj de Finnlando komencas la studojn de fremdaj filologioj ĉ. 1000 abituriintoj: po kvaronmilo por la angla kaj la sveda, 200 por la germana, po 100 por la franca, rusa k.a. 150 komencas la studojn de tradukado kaj interpretado en 4 ŝtataj lingvo-institutoj. En komercaj altlernejoj (vere universitatoj) estas specialaj linioj por fremdlingva korespondo. Ĉio ĉi en la nomo de KULTURO! Kiu kuraĝus kontraŭstari KULTURON? La sinjoroj profesoroj sputas sur viajn okulojn, se vi proponas Esperanton. Kvankam nia socio estas laŭdire "aperta", tamen ĝiaj institucioj estas komplete fermitaj...ĉu en la (fino malsupre de p.12)

Memoraĵoj de maljunulo

Kiam oni maljunulas, oni rakontas siajn memoraĵojn. Antaŭ 50 jaroj mi laboris kiel metiisto. En tiu okazo, iun frostan tagon, mi devis viziti posedanton de granda ĉapelfabriko.

Mi ne sciis, ke liaj aferoj malboniĝis, ĉar la junuloj ne plu portis ĉapelojn aŭ ĉapojn.

Kiam mi estis zorge farinta mian laboron, li ĝin grandege pagis kaj li mem min akompanis al sia pordo. En la elirejo li min demandis: "Ĉu vi ne portas ĉapelon?" - "Ne", mi respondis... Li tiris el poŝo de sia pantalono unu monbileton kun valoro de unu tago de mia laboro, ĝin donis al mi, kontraŭ mia promeso baldaŭ aĉeti ĉapelon aŭ ĉapon kaj ni disiĝis, kontentaj, ĉiu por si mem.

Proksimume unu-du monatojn poste, en bulvarado mem, kun fortega knarado, haltis aŭtomobilo apud mi, elsaltis tiu ĉapelisto, kaptis min fortege ĉe la kolumo de mia jakto, trenis min al granda magazeno de ĉapeloj antaŭ kiu ni estis, ordonis al vendisto min almeti ĉapelon laŭ koloro de mia jakto, kaj min ordonis eliri, sen ke mi povu pagi ĝin...

Monatojn poste, alvenis peto fari gravan laboron al iu kliento, kiun mi neniam antaŭe vidis, en tre riĉa kvartalo.

Akurate alvenante, kun multaj iloj kaj varoj, mi sonorigis laŭ konvena signalo. La pardonon rapidege malfermis la ĉapelfabrikestro mem, kaj li tuj fermis ĝin kun fortega frapo al mia nazo... ĉar mi estis ĉiam ankoraŭ sen ĉapelo.

Kun grandega honto mi reiris hejmen...

-nm-

Usonigo de Finnlando (fino de p.11)

eburturo de la profesoroj? La esperantistoj babilas pri "amo" kaj "sindonemo", eventuale ĝi estas la sola vojo, sed kelkfoje mi volonte kaptus toporon* por iom haki vivospacon por la homo kaj la homaro! S.P.Hurta.

*toporo : hakilo por dehaki arbojn(PIV).

La politika perlo de la jardeko :
altranguloj en sveda politiko analfabetaj.

Vespergazeto ĵus ŝokis Svedion per bildo de Hans Carling (59j.), grava politikisto en la urbo Gävle - 87500 loĝantoj - kiu konfesis, ke li estas analfabeta. Li blufis sian tutan vivon kaj nur unufoje estis senmaskigita de ĉefo... kiu silentis.

En intervjuo publikigita far "Expressen", 810112, li diras: "Nuntempe mi ne plu opinias, ke tio estas hontinda. Ne povi legi havas nenion komunan kun inteligento. Kaj mi renkontis multajn, suferantajn saman mankon, ALTRANGAJN POLITIKISTOJN kaj ekzemple unu industriestron. Ni "renkontiĝis" sidante kaj sendante tien kaj reen dokumentojn inter ni. Finfine diris mi: do vere ankaŭ ci ne scipovas legi..."

Ne mirinde, ke oni povas alpreni la plej frenezajn decidojn en multaj instancoj: Hans Carling plej verŝajne havas fratojn ĉiulande, kaj ne mirinde, ke kantistoj kiel Bernard Lavilliers povas ridindigi partiestrojn, kiam oni komparas la spektantarojn de ambaŭ specoj de amuzistoj.

Vito.

Preceptoj kaj konsiloj de prosperinta farmomastro al juna kolego:

- * Ne faru hodiaŭ tion, kion vi povos morgaŭ farigi de iu alia.
- * Timu nenion, krom la timon: Audaces fortuna juvat (Fortuno favoras aŭdaculojn)
- * Gardu vin de kormoleco: neniun kompaton al lamaj anasoj!
- * La ŝvito de aliaj homoj ne malbonodoras... kondiĉe nur, ke vi ne tro proksimigu vian nazon.
- * Ĉiam apogu vin sur la moralaj principoj: ili ja iam fine cedos.

Eble la legantoj mem eltrovos kelkajn aliajn...

Ekzemple:

- * Preferu esti nomata fiulo ol naivulo.
 - * Preferu esti timata ol estimata.
- ks.

Valo.

Tra Eùropo per fervojo
kaj Esperanto (daùrigo)

Varsovio

Kun bileto de unua klaso mi povis trovi malplenan kupeon kaj dormi. Je la naŭa mi estis en Varsovio. Taksio kondukis min al la suburba vilao, kie estis Walter, kaj lin vekis. Walter klarigis, ke li prunteprenis la vilaon de amiko, kiu estas responsulo en la partio de polaj laboristoj, ĉar li volas esti trankvila dum la festoj por prepari seminarion de interlingvistiko. Bonvole li respondis miajn demandojn : la telegramon li ne ricevis ; en Polio la vartraĵoj havas antaŭrajton, ĉar ili konstruas socialismon, tial vojaĝantoj neniam scias, kiam ili alvenos ; polaj taksiistoj estas kapitalistoj sufiĉe riĉaj por aĉeti proprajn aŭtomobilojn, tial la veturado de Varsovio al suburbo kostas pli ol la veturado per trajno de Rzeszow al Varsovio.

La vilao de la reprezentanto de la laborista klaso estis sufiĉe komparebla al vilao de juna dinamisma responsulo de kapitalista entrepreno en Francio : du etaĝoj, necesejo kaj banejo sur ĉiu etaĝo, telerlavilo, kaj grandega hundo por gardi la domon kontraŭ laboristoj, kiuj eventuale volus ŝteli de sia reprezentanto. La diferencoj estis, ke la telefono, kvankam petita, ankoraŭ ne estis instalita, kaj ke la televidilo estis nur nigra kaj blanka. Mi okupis la ĉambron de la infano. Ĝi estis ornamita per bildo de Jesuo sur la monto olivarba, kun stilo apenaŭ pli eltenebla ol en la ĉambro de Eùgeno, sed kun formato multe malpli granda. En la kuirejo estis alia ikoneto, mi havis la impreson, ke ĝi reprezentas Leninon, sed li havis tiom karikature severan mienon, ke mi dubis, kaj demandis Walter. "Jes, diris li, estas Lenino, ni alkroĉis la portreton tiom alte, kiom ni povis, ni diras "Saluton, Vladimiro!" kaj tre ridas." Supozeble tio estas pola humuro. Dum dek tagoj en Pollando, nur tiun ununuran portreton de Lenino mi vidis. Karlono Marks mi ne vidis. Ruĝa flago estas sur ĉiu konstruaĵo de la laborista partio, sed en konstruaĵoj de la

popola pola respubliko estas la nacia aglo, kaj nenio pli. La polo, kies portreton mi oftege vidis, estis Johano-Paŭlo la Dua, sed kompreneble nur en preĝejoj kaj privataj domoj.

En Varsovio ni vizitis la diplomatajn kvartalojn. Sur placo estas du monumentoj : unu simbolas, kiom ĝojaj estas la poloj, ke ilin liberigis Sovetio en 1945, ĝi estas tiom granda, kiom la monumento de militfalintoj en la vilaĝo de mia parenkaro (300 loĝantoj). La dua monumento, konstruita de Sovetio, simbolas la amikecon de sovetoj al poloj. Grandega estas la amikeco de Sovetio al Polio, sed ĝi estas en stilo, kiun neniu polo povas elteni. Tiu soveta "Palaco de la Kulturo" estas en la stilo socialista soveta betona de la epoko de Stalino. Mi tiom ŝatas tiun stilon, kiom tiun de la Ringstrato en Vieno. Ni provis supreniri sur tiun grandiozan monumenton por vidi la tutan Varsovion, sed dum la katolika festo ne eblas supreniri sur monumenton socialistan sovetan.

Sur alia placo de Varsovio estas du proksime same grandaj domoj : la domo de la laborista partio de Pollando kaj la ambasadejo de Vatikano.

Sed la plej granda domo de Varsovio estas la konsulejo de Sovetio, por ĝi necesas tuta strato, multe pli, ol por pola laborista partio kaj vatikana ambasadejo kune.

Ni vidis ankaŭ la palacon de unu el la reĝoj de Pollando sed pli granda estas la palaco de la urbestro de Varsovio.

Post tiuj artaj emocioj, ni iris manĝi. Walter diris, ke laŭ lia sperto, ne utilas konduki okcidentanon al bona restoracio por riĉaj poloj, ĉar tie okcidentano trovas nenion bongustan por si. Ni iris al modesta memserva restoracio, kaj mi bonege manĝis. Unu manĝo estis pastaĵoj kun viando en ili, kiujn en mia lando mi nomus "ravioli", se ili estus kun tomatsauco. Sed en Varsovio estis saŭco violkolora, kies recepton mi ne konas. Poste venis krespo kun fungoj.

Kun plenaj stomakoj ni iris vidi la katedralon de Varsovio. Walter montris al mi, ke en Pollando oni entombigis ĉiujn gravulojn en preĝejoj : artistojn, politikistojn, rezistantojn luktintajn kontraŭ germanoj aŭ kontraŭ rusoj. Nur komunistojn ne. Mi vidis bildon dediĉitan al iam pola urbo nun en Sovetio, kaj Walter montris al mi

multajn ŝildetojn tie metitajn de poloj kiel signojn de fideleco. Inter ili estis ŝildoj de liceanoj, t.e. gejunuloj neniam travivintaj alian realon ol la popolan respublikon. Walter demandis min, ĉu mi komprenas, ke en Pollando la katolika eklezio estas loko de libereco, kaj mi diris, ke kio veras por unu nacio ne devas esti ĝeneraligata. Ni volis viziti la tombon de Zamenhof en la juda tombejo, sed la 24an de decembro en Varsovio frue alvenas la nokto, kaj malfrue alvenas la tramoj, pro la katolika festo, tial ni rezignis.

Reveninte en la domo de la reprezentanto de la laborista klaso, ni aŭdis la polan ŝtatan radion, sed estis nur religiaj kantoj. Ni rigardis la televidon. Estis angla filmo pri fidela hundino Lassie, kaj mirbela pola desegnita filmo kun klasika muziko. Ĝi estis adaptita de la fabelo pri Cindrulino, sed la sceno okazis dum la kristnaska vespero, kaj Cindrulino estis pola knabino kun granda bela kristarbo. Ankaŭ la prezentistino de la pola televido havis kristarbon. Dum la informbulteno estis intervjuataj poloj, kiuj revenis al Polio por la festoj: unu revenis de Usono; unu de Saint-Etienne (Francio) kun sia franca edzino. Intervjuata estis flugisto, kiu zorgis pri la ununura flugilo de la pola armeo, kiu kontrolas la aeron spacon de la respubliko dum la nokto. Mi igis Walter ripeti sian tradukon, ĉar mi miris, ke estas en la ĉielo de la tuta lando unu flugilo, sed Walter diris, ke neniu polo povas imagi, ke la lando estas atakata dum la kristnaska nokto. Post la informoj, estis kristnaska mistero, sed komika. Dum la vespero alvenis poŝtisto kun mia telegramo, kaj li petis ekskuzon dirante, ke li estis tiom ebria, kiam alvenis la telegramo, ke li lasis ĝin en angulo, kaj nur poste ĝin retrovis. Por lin resanigi de lia emocio, Walter donacis al li glason da vodko.

Por veraj katolikoj (t.e. por preskaŭ neniu franco), la 24an de decembro estas fastotago ĝis la noktomezo, tiel ne povas esti altkvalita pola viando por la vespermanĝo, kio por okcidentanoj estas ege ĝojinda kristnaska novaĵo. Tradicia pola vespermanĝo antaŭkristnaska enhavas 12 manĝojn, la plej elstara estas karmo. Nu ja, volonte mi fastus ĉe polaj katolikoj! Kristnaska karmo superas la kapablojn de Walter, sed mi gustumis alian el la 12

manĝoj, preparitan kun brasiko.

Dum la mateno de la 25a de decembro ni aŭdis la polan radion. Estis kantoj de diversaj landoj, interalie francaj kantoj tute belaj kaj inteligentaj, kiujn mi neniam aŭdis ĉe la franca radio. Inter la polaj kantoj estis unu tradicia por infanoj. Walter tradukis al mi la tekston: "Hundo manĝis la reĝon, kato manĝis la reĝinon, kaj la reĝidon manĝis muso, sed ne ploru, kompatinda infano, ĉar estis la reĝoj sukeraj, kaj sukeraĵojn rajtas formanĝi ankaŭ bestoj".

Ĉe alia programo kanzonistoj rakontis blagojn, ekzemple jenan: "Post la naskiĝo de la kristinfaneto, la socialista ŝtato donacas al Josefo loĝejon por vivi kun sia familio. Eniras Maria kun la infaneto sur brako. Eniras Josefo portante la valizojn. Eniras anĝelo por protekti la sanktan familion. Eniras paŝtisto kun ŝafideto sur la ŝultroj. Eniras la unua orienta reĝo. Eniras la dua orienta reĝo. Sed kiam eniras la tria reĝo, tiom solida estas la socialista planko, ke ĝi frakasigas."

Ni iris al la urbo por tagmanĝi, sed estis malfacile trovi restoracion, ĉar estis kristnasko, kaj ĉar estis nur la dua horo. Mi ricevis fungojn kun kremo, kaj likvaĵon kun kokida viando. Ambaŭ gustis bonege.

Kvin minutojn antaŭ la tria horo, ni iris vidi la ŝanĝon de la gardostarantoj ĉe la monumento de polaj falintoj de la dua mondmilito. Malgranda estas tiu monumento, kiel ĉiuj monumentoj konstruitaj de poloj en Varsovio. Mi kredas, ke ĝi estas instalita en la ruino de iu kastelo, sed ne plu memoras. En ĝi estas tero de diversaj batalkampoj, kie poloj luktis por libero, kaj la longega listo de la bataloj. Sur la tombo de la nekonata pola soldato normale brulas eterna flamo, sed kiam ni alvenis ĝi estis estingita. Walter demandis soldaton, kaj li rapide flustris - ĉar gardostaranto ne rajtas paroli - ke tro forte blovis vento. Walter diris, ke je la tria horo alvenos oficiro kun du soldatoj, sed ke en la pola armeo ĉiuj uniformoj estas sufiĉe similaj. Kvin minutojn post la tria, alvenis tri simplaj soldatoj ansermarŝante. Du anstataŭis siajn kamaradojn, kiuj ansermarŝis kun la kondukinto dum du aŭ tri metroj. Poste, la tri junuloj babilis kiel soldatservantoj, kiuj ĵus finis la deĵoradon. La kondukinto revenis al la flamo per normala paŝo, tiris de sia poŝo

skatoleton da alumetoj, kaj rapide remetis flamon sur la tombon de la nekonata soldato. Tiu verŝajne opiniis sin sufiĉe honorata, ĉar li ne turnis sin en la tombo. Mi diris al Walter, ke mi scivolemas, kion faras polaj katolikoj dum la kristnasko. Do ni iris al unua preĝejo kaj trovis geedziĝon. Ni iris al dua preĝejo, estis alia geedziĝo, kaj mi ne volis resti, ĉar mi estis ŝokata de la riĉeco de tiu preĝejo. Ni iris al alia preĝejo, pli simpla. Tie ne estis geedziĝo. Estis granda portreto de la papo, la ŝildo de la papo, rubando ruĝa-blanka (koloroj de Polio), rubando flava-blanka (koloroj de Vatikano), kaj estis skribite: "Pollando ĉiam fidela al la papo". Mi diris al Walter, ke la koloroj de Vatikano estas en neniun franca preĝejo, ke cetere tio ne utilis, ĉar neniun franca katoliko ilin rekonas. Walter diris, ke en ĉiu katolika preĝejo de Pollando estas altaro de la Sankta Virgulino, ĉar ŝi estas reĝino de Pollando. Komenciĝis la meso, junaj francaj katolikoj opiniis ĝin multege tro tradicia. Rapide alvenis la komunio, kaj mi diris al Walter, ke en Francio neniun ŝokiĝus, ke mi elirus. Do ni eliris, kaj kelkaj ŝokiĝis. Mi demandis Walter, kial la meso estas tiom rapida, kaj li diris, ke estas jam la sesa meso de la tago, kaj ke mi ja vidis, ke la preĝejo estas plenplena, kaj ke ekstere atendas tiom da homoj por la sepa meso.

Poste ni iris al la ortodoksa katedralo de Varsovio. Ĉeestis la patriarko kaj la alta klerikaro, kaj Walter devis signi al mi, ke mi fortiru la manojn el miaj poŝoj, pri tio mi ne atentis, ĉar dum mia infanaĝo en pariza suburbo tio ne ŝokis katolikan kardinalon. La ortodoksa meso daŭras kutime du ĝis tri horojn, sed ni alvenis proksime de la fino. Oni estis honoranta la ikonojn. Mi prenis kandelon kaj provis fari kiel la aliaj virinoj. La pastroj belege kantis en malnova slava lingvo, kaj ankaŭ en la ukraina. Post multe da incensado la pastroj atingis la parton de la preĝejo, kiu reprezentas la ĉielon, kaj ŝlosis oran pordon, tiel signante, ke la meso estas finita. Mi ne povas diri, ke la ortodoksan liturgion mi komprenis, ĉar ĝi turnas sin al alia karakterizo de homo, ol la racio, sed ĝi tute impresis min, ĉar ĝi estas tre nobla. Estis multaj seĝoj

por malsanuloj kaj maljunuloj, sed ĉiuj ĉeestantoj staris. Estis multe malpli da homoj ol en la katolikaj preĝejoj, sed ne estis kristnasko, ĉar la ortodoksoj havas alian kalendaron. Estis poloj, sed ankaŭ sovetianoj, ĉar sovetianoj scias, ke en Varsovio oni povas senprobleme eniri la ortodoksan katedralon.

Ni iris al la stacidomo por peti informojn pri mia revenvojaĝo de Bjalistoko al Berlino, kaj ni eksciis, ke estas rekta trajno, kaj ke oni ne povas pagi por ĝi per zlotoj, kompreneble. En la stacidomo Walter aĉetis por mi la germanlingvan eldonon de pola ĵurnalo. En ĝi mi povis legi, ke estas entute nenio vidinda en la teatroj de Varsovio, kaj ke la pola industrio konsumas trioble pli da energio, ol ĝi devus, ĉar ĝi estas malracie planita. Tiuj artikoloj donis al mi bonegan impreson pri Polio. En Francio, mi kelkfoje legis sovetajn gazetojn en franca lingvo: en sovetaj gazetoj, ĉio ĉiam iras glate. En GDR, mi ofte legis ĵurnalojn verkitajn por GDR-anoj: en GDR-aj gazetoj, kelkfoje io ne iras glate, kaj pri tio kulpas la kapitalismaj landoj, ekzemple, pri la muro en Berlino kulpas kapitalismo. Tial la informo, ke io ne iras glate en Polio pro kulpo de poloj vere surprizis min, eĉ mallonge antaŭ grava ŝanĝo de la registaro, pri kiu ĉiuj poloj jam sciis, kaj pri kiu mi poste legis en francaj gazetoj, ke ĝi estas surprizo.

Pri mia vojaĝo al Bjalistoko, ĉar mia nerva sano postulas multe da dormo, ni interkonsentis, ke mi foriros dum la posttagmezo de merkredo la 26a de decembro.

Post malfrua vekiĝo merkredon matene, Walter alvokis al mia materia kaj spirita helpo por de li ne ŝatata tasko: lia amiko pruntedonis al li la dometon nur kondiĉe, ke ĉe lia reveno estos kristarbo por lia infano. Dum ni plenumis tiun sanktan (?) taskon, mi proponis al Walter aŭdi diskon kun kristnaskaj kantoj, kiun mi aĉetis por krakova esperantisto, kiun ni estus vizitintaj, se ni estus irintaj al Krakovo. Mi aĉetis tiun diskon, ĉar la krakova samideano estas tre pia, kaj sur la disko estas foto de papo Johano-Paŭlo la Unua, kiu pape mortis. Sed pri vivoj kaj mortoj de papoj mi ne interesiĝas, ĉar mi estas kristana. Mi aŭdigis al Walter la poemojn de André WECKMANN kantatajn de René EGLÉS, kaj la satirajn kanzonojn de la Scheligemer, kaj siaflanke li aŭdigis al mi polajn kantojn belegajn, sed

ĉiujn tragikajn. Post la ornamado de la kristarbo ni volis paki la valizon, kaj mi demandis Walter, kiun el la diskoj mi lasu al li kiel donacon. Li diris, ke li prenos la diskon de la papo, mi iom miris, sed menso de ateisto estas pli granda mistero, ol nia surtera ekzisto.

(daŭrigota!) Jakelino.

Morto atendas ĉevalojn fine de infera vojaĝo !

Francoj manĝas ĉevalviandon. Sed nun francaj kamparanoj ne povas provizi buĉejojn, ĉar plejofte maŝinoj kaj traktoroj anstataŭas ĉevalojn.

Do buĉistoj devas aĉeti ĉevalojn en fremdaj landoj : Polio, Hungario, Jugoslavio kaj Hispanio, kiuj proponas (ofertas) ilin je malalta prezo. Do Francio aĉetas.

La plej longa irado

Por ke estu pli da profito, ĉevaloj vojaĝas per la malplej kosta vojo, uzanta la malplej trapasatajn fervojojn. Forlasinte Polion, malrapida serpentvagonaro trapasas, unu post la alia, G.D.R. kaj G.F.R. kaj atingas Apach, en Mozelo, ĉe la franca limo. Se ĉevaloj estas jugoslavaj, ili estas transportataj en tiel sama skandala kondiĉo. Ili trapasas Zagrebon, Trieston ĉe la itala limo, Venicion, Milanon, kaj Modanon ĉe la franca limo. Milojn da kilometroj, dekojn da haltoj, ĉe ĉiu stacio.

Ruliĝanta malliberejo

Ili estas envagonigitaj kiel haringoj en barelo ! Postaĵo ĉe postaĵo, nazego ĉe nazego. Amasigitaj, kunpremitaj. Kaj la vagonoj estas ŝlositaj : la fermitaj pordoj estas plumbosigelitaj. La fenestretoj enlasas malmulte da aero. Ili vojaĝas starantaj sur piedoj dum multaj tagoj, kelkfoje dum semajnoj. La pajlo sur la planko baldaŭ malpurigita pro fekaĵoj. Sen trinki, sen manĝi.

Por iri morti, la ĉevaloj sekvas la plej longan kaj la plej mizeran vojon. En ilia malseka, globa okulo :

teruro, angoro !

Ili laboradis, plugadis, tiradis agrokulturilojn, portadis ŝarĝon. Nun ili estas kvazaŭ elpremitaj citronoj, kun eluzitaj muskoloj, nekuraceblaj tendenitoj, angulformaj korpoj ! Nek retiriĝo, nek ripozo, nek kompatato : buĉejen !

La voko por helpo

Inferaj vojaĝoj daŭras multajn tagojn, eĉ semajnojn. Ekzemple, foririnte el Polio la 31an de marto, ŝarĝo atingis Tuluzon la 7an de aprilo ! Se ĉevaloj atingas vendrede vespere, la aĉetantoj ne venas tuj serĉi ilin, prokrastante ĝis post la semajnofino ! Du pliajn tagojn en ŝlositaj vagonoj por la kompatindaj viktimoj.

En stacio Raynal (Renal) fervojistoj provis doni trinkaĵon al tiuj kapoj, kiuj serĉas tra fenestretoj iom da humaneco !

Fervojisto rakontas :

"Foje estis abomene. Mi nokte deĵoris iun sabaton. Mi provis ne aŭdi, okupiĝi pri alia afero, ne eblis ! La ĉevaloj senĉese kalcitris, svingante siajn hufojn kontraŭ la metalajn vandojn : obtuza, malesperega bruoj, mesaĝo ŝarĝita de teruro, de angoro."

La skandalo plu daŭras

Hieraŭ (aŭgusto '80) la ĉevaloj venis de la Sudo, ne de la Oriento. Ilia vagonaro estis traveturinta Hendaye (Handaj), sed kiam ? En Renal-stacio ŝvebis haladza odoro ĉirkaŭ la kajoj. Matenmeze oni finfine pensis malfermi la vagonojn. Sep kadavroj tie kuŝis. Mortigitaj de la varmo, aŭ eble de soifo. Viktimoj por pruvi, ke skandalo ekzistas, kaj plu daŭras.

Eltirite el "La Dépêche du Midi"
esperantigis A. Mas.

P.S. La ĉevalo - plej bona amiko de l'homo. Jes, sed ĉu la homo estas la plej bona amiko de l'ĉevalo ?

La venonta numero de "Laŭte!" :
meze de aprilo !

Kulturaj semajnfinoj

Metz (Loreno, Francio) : Verŝajne la venonta kultura semajnfino okazos la 28an kaj 29an de junio, kaj verŝajne la supera grupo studos la romanon "Vojaĝo al Kazohinio". Informoj haveblaj ĉe : s-ro DE ZILAH, 39, rue Joseph Hénot, F 57070 METZ.

Langen (Hesio, Germanio) de la 3a ĝis la 5a de aprilo, de la 2a ĝis la 4a de oktobro, de la 20a ĝis la 22a de novembro. Informoj haveblaj ĉe : Manfred Führer, Am Stadtpfad 11, D-6236 Eschborn/Ts.

Sarlando (Germanio) : de la 8a ĝis la 10a de majo, de la 25a ĝis la 27a de septembro. Informoj haveblaj ĉe : Sarlanda Esperanto-Ligo, Schulstrasse 30, D 6601 SCHEIDT.

* Alain Poher, Prezidanto de la Franca Senato, honora prezidanto de la 73a Franca E-Kongreso. S-ro Alain Poher akceptis la honoran prezidantecon de la 73a Franca Kongreso, kiu okazos en Perpignan de la 5a ĝis la 9a de junio 1981. Senatano Francis Palmero, kiu prezentis antaŭ la Senato la leĝan proponon por la instruado de E en la mezaj kaj superaj lernejoj, akceptis ankaŭ esti honora prezidanto de tiu franca kongreso. Informojn pri la 73a landa kongreso donas : "Centre Culturel Espérantiste", 72, av. Général de Gaulle, 66000 PERPIGNAN.

* La 15a volumo de la granda kataluna enciklopedio ĵus aperis kaj la tuta serio estas altvalora trezoro por la amantoj de la lingvo kaj kulturo de Katalunio.

Ĉe la litero L ni trovas la nomon de LLECH-WALTER Renat kun la sekventa teksto : "Verkisto. En 1921 li fondis kun sia frato la klubon "Le Cénacle" (kun kursoj de esperanto). Prezidinto de la Franca Unio por Esperanto. Prezidanto de la Gajaj Trobadoroj. Prezidanto de la Politeknika Asocio kaj de la grupo por katalunaj studoj. Aŭtoro de kurso pri la kataluna lingvo kaj aŭtoro de verko pri la kataluna literaturo".

En tiu granda enciklopedio ĉe la vortoj "espérantisme" kaj "esperanto", longaj artikoloj klarigas la aferon kaj kliŝoj ilustras la klarigojn.

Oni scias, ke René LLECH-WALTER estas la prezidanto de la L.K.K. de la 73a Franca Kongreso, kiu okazos en Perpignan (Francio) kun partopreno de multaj hispanaj samideanoj (Katalunia parto).

A. Vidal.

E-VIVO

* En Ĝirondio :

Jen la datoj de la venontaj kunvenoj de la Ĝirondia Grupo :
- la 14an de februaro je la 15a horo en la lernejo de CAVIGNAC.
- la 14an de marto je la 15a horo en EYSINES. Propagandkunveno.
- la 28an de aprilo je la 19a horo en CENON - Maison pour Tous.

* Esperanto-Semajnofino en AVINJONO :

La 28an de februaro kaj la 1an de marto la Vaŭkluzo Federacio kaj la Avinjona Grupo prizorgos E-semajnfinojn en Kastelo Barbière.

Kvar lingvoniveloj estas antaŭviditaj : de la "veraj" komencantoj ĝis tiuj, kiuj havas la nivelon de la Atesto pri Praktika Lernado. Tiu staĝo celas havigi al la grupoj novajn lernantojn kaj samtempe perfektigi la aliajn. Interesatoj, turnu vin al GENTE, 9 av. des Erables, F 84000 AVIGNON.

Prezo : 60 FF (inkluzive de la du manĝoj) kaj 90 FF (inkluzive de la manĝoj, tranoktado kaj matenmanĝo).

* La Hispana Esperanta Junulara Sekcio aranĝas 5an Renkont-

igon en suda Hispanio, la 17., 18., 19ajn de aprilo. Kampadejo en ELCHE (Alicante), Camping Palmeral, strato Curtidores. Por pli da informoj : Antonio VERDU, c/Jose Bernard Amoros 38-30 1a ELCHE (Alicante) - Hispanio.

* Barcelona E-Centro komencos la mezan kaj superan kursojn
***** de E. la 16an kaj 19an de februaro.

* Kulturaj semajnofinoj :

La Chaux de Fonds (Svisio) : la 28an kaj 29an de marto 1981. Estos tri grupoj. La supera grupo studos romanojn de Julio Baghy. Informoj haveblaj ĉe : Kultura Centro Esperantista, Postiers 27, CH-2301 La Chaux de Fonds.

Directeur de publication et imprimeur: Baudé, 47340 Laroque T.
Commission paritaire de presse : n°58651.